Savez za esperanto Bosne i Hercegovine
Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino
Савез за есперанто Босне и Херцеговине

RONDA TABLO

# LINGVO KAJ ARTEFARITA INTELEKTO

## SARAJEVO, la 20-21 de februaro 2025

- INFORMAĴO 1-

SUB AŬSPICIO DE LA :
FEDERACIA MINISTERIO PRI SCIENCO KAJ EDUKADO

# Enhavo:

1. Pri la organizanto ........ 3
2. Aŭspicianto ........ 3
3. Celo de la Ronda Tablo ........ 3
4. Temaro ........ 4
5. Enkondukaj prelegantoj ........ 4
6. Partoprenantoj ........ 5
7. Aliĝo por partopreno ........ 5
8. Skizo de la programo ........ 5
Skizo de la programo: ........ 6
Enkondukaj prelegoj ........ 6
9. Laborlingvo/tradukado ........ 7
10. Lokaĵoj ........ 7
11. Amasmedioj kaj publika informado ........ 7
Publikigo de prelegoj kaj diskutoj ........ 7
12. Alvenoj kaj foriroj el/al eksterlando ........ 8
Transportado de la flughaveno aŭ aŭtobusa/trajna stacidomo ........ 8
13. Loĝigo ........ 8
14. Oficialaj kontaktinformoj ........ 8

# 1. Pri la organizanto

Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino estas asocio de adeptoj de la Internacia Lingvo Esperanto kiu agadas en la tuta Bosnio kaj Hercegovino. La asocio heredas tradicion de la Esperanto-ideo ankoraŭ ekde 1910, kiam estis fondita la unua E-societo en Bosnio kaj Hercegovino.

Ĉefa celo de la Esperanto-Ligo de BkH estas disvastigi la Internacian Lingvon Esperanton inter la loĝantaro de Bosnio-Hercegovino, disvolvadi la E-movadon kaj organizi la membraron por praktika uzado de Esperanto en internaciaj rilatoj cele al forigo de lingvaj baroj, plifirmigo de la paco, protekto de homaj rajtoj, plifortigo de reciproka respekto kaj amikeco, interŝanĝo de spiritaj valoraĵoj kaj disvolviĝo de demokrataj rilaton en la internacia vivo.

La asocio havas longan tradicion kaj riĉan historion de socia aktivismo, samkiel kontribuon al la bosnia scienco interalie per organizado de sciencaj kunvenoj:

- Eŭropa Unio hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ - lingvaj kaj kulturaj aspektoj, Sarajevo en 2010
- Sociaj aspektoj de la Esperanto- movado, Banjaluka en 1987;
- Lingvo kaj internacia komunikado, Sarajevo en 1984;
- Lingvo kaj rasismo, Sarajevo en 1976.

# 2. Aŭspicianto

La aŭspicianto kaj ĉefa financanto de la Ronda Tablo estas la Federacia Ministerio pri Scienco kaj Edukado.

# 3. Celo de la Ronda Tablo

Lingvo kaj artefarita intelekto estas la temo, kiu kunigas du sciencajn sferojn, humanismajn kaj teknikajn sciencojn. Celo de la Ronda Tablo estas faciligi interdisciplinan debaton instigante pluan studadon de la fenomeno por atingi novajn vidpunktojn kaj realigeblajn ideojn.

Kunvenigante kompetentajn personojn el enlandaj kaj internaciaj sciencaj kaj profesiaj rondoj, oni celas iniciati scienc-fakan debaton pri diversaj aspektoj kaj demandoj de lingva evoluo kaj tiurilataj eblecoj de aplikado de artefarita intelekto (AI), plue pri la metodologiaj aliroj por samtempe plimultigi alireblon al informaĵoj en naciaj, etnaj kaj planlingvoj.

Unu el la celoj estas oferti platformon por interŝanĝo de praktikoj, spertoj kaj ideoj pri la uzado kaj perspektivo de la artefarita intelekto en la mondo kaj Bosnio-Hercegovino. Samtempe, per amaskomunikila promocio oni volas popularigi la temojn de ciferecigo, artefarita intelekto kaj aplikado de modernaj teknologiaj kaj komunikaj solvoj en la praktiko (instruado, scienco, ekonomio, ktp).

## 4. Temaro

Temoj pri kiuj oni debatos en la kunveno (ne strikte limigitaj) estas la jenaj:

- Matematikaj kaj komputilaj principoj de prilaborado de lingvo kaj permaŝina instruado
- Aplikado de artefarita intelekto en lingvoesplorado
- Influo de AI kaj tutmonda socio al statuso kaj prestiĝo de lingvoj
- Uzado de artefarita intelekto en lingvoinstruado
- Aspektoj, tendencoj kaj atendoj de la uzado de modernaj lingvoj en media kaj akademia diskurso
- Influo de AI al maŝintradukado, postredaktado, etiko ktp
- Apliko de AI en konservado de heredaĵo de mortintaj kaj malmulte uzataj lingvoj

Ĉiuj prelegantoj kaj aliaj referantoj estas bonvenigataj mem proponi titolojn de siaj prelegoj kiujn ili opinias plej trafajn por trovi sian lokon ene de la simpozia temaro.

## 5. Enkondukaj prelegantoj

La kunveno celas kunigi sciencistojn, fakulojn kaj esploristojn el la sferoj de lingvoscienco, edukaj sciencoj, komunikologio, sociaj sciencoj kaj priinformaj teknologioj por interŝanĝi siajn spertojn kaj esplorojn partoprenante krome en sagacaj diskutoj pri la uzado de artefarita intelekto en esplorado de lingvo, en didaktiko, pri influo de maŝintradukado al lingvo, ties etika uzado, postredaktado ktp.

Per la laŭcela elekto oni volas certigi enkondukajn prelegojn de almenaŭ ses ĉefparolantoj. Aspirante diversecan strukturon oni povas atendi inter ili doktorojn de la sciencoj, altrangajn praktikantojn kaj esploristojn enlandajn kaj eksterlandajn por pli malferma enrigardo en la temon.

La ĉefaj prelegantoj estas petataj ĝis la 02.12.2024 plej malfrue konfirmi sian partoprenon precizigante titolon de sia temo. Mallonga skriba resumo de la prezento (ĝis 150 vortoj), konciza biografio kaj fotaĵo, laŭeble estu senditaj antaŭ la 13.01.2025 jaro.

# 6. Partoprenantoj

Atendante proksimume tridekon da partoprenantoj de la Ronda Tablo oni volas certigi pli larĝan aliron al la temaro el diversaj sciencaj, profesiaj kaj spertulaj rondoj el la lando kaj eksterlando.

Parto de la partoprenantoj estos rekte invititaj, kaj por interesiĝantoj estas eblecoj rekte kontakti la organizanton kaj esprimi sian deziron partopreni la aranĝon. Post la aliĝo ĉiuj partoprenantoj ricevos konfirmon pri la akceptita aliĝo kaj teknikajn informojn.

La listo de konfirmitaj partoprenantoj estos disponebla poste.

# 7. Aliĝo por partopreno

Petoj por partopreno en la kunveno povas esti farita sendante kompletan plenigitan formularon (Aliĝilo) alkroĉitan per retpoŝto al: info@esperanto.ba.

La limdato por sendi aliĝilojn por partopreno estas la 13.02.2025, je sep tagoj antaŭ la kunveno.

# 8. Skizo de la programo

La programo antaŭvidas debaton pri influo de la artefarita intelekto kaj tutmonda socio je statuso de naciaj, etnaj, agnoskitaj kaj neagnoskitaj lingvoj kaj de la planlingvo kiel pligrandigi aliron al la lingvaj resursoj kaj kontribui al evoluigo de la inform-socio kaj la scio-socio.

La Ronda Tablo estas projektita kiel dutaga evento kun enkondukaj prelegoj en daŭro de po 20 minutoj, post kio sekvos diskuto de ĉiuj interesiĝantaj partoprenantoj moderata de prezidanto de la sesio.

La programo antaŭvidas la eblecon okazigi vesperan debaton pri la temo kiun proponos akademia institucio gastigonta la enkondukan prelegon.

Programo de la Ronda Tablo estas ankoraŭ prilaborata, tiel ke finan version oni difinos post kiam estos konataj nomoj de ĉiuj prelegantoj kaj la de ili prezentotaj temoj.

## Skizo de la programo:

| ***Ĵaŭdo, 20.02.2025.*** | |
|---|---|
| 10.00 - 10.30 | Malfermo de la kunveno |
| | Bonvenigaj paroladoj de la organizantoj, aŭspicianto kaj eminentaj gastoj de la simpozio |
| 10.30 - 12.30 | Enkondukaj prelegoj |
| | Matematikaj kaj komputilaj principoj de prilaborado de lingvo kaj permaŝina instruado |
| | Aplikado de AI en esplorado de lingvo |
| | Diskuto |
| 12.30 - 14.30 | Tagmanĝa paŭzo |
| 14.30 - 16.45 | Enkondukaj prelegoj |
| | Influo de AI kaj tutmonda socio al statuso kaj prestiĝo de lingvo |
| | Uzado de AI en lingvoinstruado |
| | Diskuto |
| 20.00 - 22.00 | Akcepto por partoprenantoj de la simpozio |
| | Vespermanĝo |

| ***Vendredo, 21.02.2025.*** | |
|---|---|
| 9.30 - 11.30 | Enkondukaj prelegoj |
| | Spertoj pri uzado de la planlingvo Esperanto en informadikaj sistemoj |
| | Influo de AI al maŝintradukado, postredaktado, etiko ktp |
| | Diskuto |
| | Fermo de la kunveno |

# 9. Laborlingvo/tradukado

Laborlingvo de la Ronda Tablo estos la bosna/kroata/serba.

Por la Esperanto-parolantoj estos certigita tradukado de enkondukaj prelegoj kaj diskutintervenoj.

La tradukado ne estos disponigita ekster oficialaj sesioj, kafpaŭzoj, manĝoj, kaj ĉiuj partoprenantoj estos kuraĝigitaj komuniki unuj kun la aliaj laŭ la de ili elektota maniero.

# 10. Lokaĵoj

La kunveno okazos en Sarajevo. La organizantoj planas okazigi laborsesiojn en salonoj de unu el fakultatoj de la Universitato de Sarajevo.

Precizaj lokaĵoj (akceptejo, hoteloj, restoracioj) estos konataj poste.

# 11. Amasmedioj kaj publika informado

Pere de novaĵagentejoj, elektronikaj kaj presitaj amaskomunikiloj, la publiko estos adekvate informita pri okazigo de la kunveno, temoj kaj prelegantoj en la kunveno.

Amasmedioj interesitaj pri specialaj mediaj kontribuaĵoj, gastoj en elsendoj aŭ intervjuoj kun kelkaj el la partoprenantoj povas kontakti la organizanton per retpoŝto: info@esperanto.ba.

Enlandaj sciencaj ĵurnaloj kaj amasmedioj kiuj raportas pri scienco estos invititaj partopreni la kunvenon.

Malfermo de la kunveno estos anoncita aparte, kaj la ĉeesto al ĉiuj interesataj amasmediojoj estos ebligita por filmkadroj, deklaroj kaj filmadoj de raportaĵoj.

## Publikigo de prelegoj kaj diskutoj

La organizanto planas aŭdvidan registradon de ĉiuj prelegoj kaj diskutoj dum ambaŭ tagoj de la kunveno.

Estas planite, ke, kiel daŭrigo de ĉi tiu projekto, baldaŭ la registrita materialo de la kunveno estos prilaborita kaj publikigita en formo de kolekto de referaĵoj, kun antaŭa aprobo de la aŭtoroj.

Ankaŭ, enlandaj kaj internaciaj profesiaj kaj sciencaj revuoj eblos elŝuti kaj publikigi prezentaĵojn de la kunveno, kun antaŭa konsento de la aŭtoroj.

# 12. Alvenoj kaj foriroj el/al eksterlando

Pro la buĝetaj limigoj la organizanto interkonsentos kun invititaj prelegantoj kaj partoprenantoj la manieron de transporto, alven- kaj forir- horoj, rezervigon kaj aĉeton de flugbiletoj, trajn- aŭ bus-biletoj.

Por invititaj prelegantoj kiuj alvenos per propraj veturiloj, la organizanto interkonsentos pri la pagmaniero por fuelo kaj aliaj kostoj.

La organizanto ne povas kovri vojaĝkostojn de enlandaj partoprenantoj.

## Transportado de la flughaveno aŭ aŭtobusa/trajna stacidomo

La organizanto zorgos pri la transporto al la hotelo de invititaj gastoj el eksterlando post la alveno kaj ĉe la foriro.

# 13. Loĝigo

La organizanto prizorgos loĝigon por invititaj prelegantoj venantaj el eksterlando.

Loĝado kun matenmanĝo estos en hotelo en unu-litaj ĉambroj.

La organizanto ne transprenas kostojn por eventuale pliaj personoj akompanantaj la gaston.

Pro limigitaj monrimedoj, la organizanto ne povas transpreni loĝigon por partoprenantoj el Bosnio kaj Hercegovino.

# 14. Oficialaj kontaktinformoj

La organizanto estas kontaktebla per la retadreso: info@esperanto.ba por teknikaj demandoj, amaskomunikiloj, sendado de petoj por partopreno kaj ĉiuj aliaj demandoj.

Prezidanto de la Organiza komitato: Šefik Rizvanović, prezidanto de la Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino.

Projektgvidanto: Edin Čolić, sekretario de la Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (+38761508820).